

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

DECEMBRO 1979
67-A JARKOLEKTO

7

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Program tar form

Fasta tider och mera överskådligt program kan deltagarna i nästa års internationella esperantokongress vänta sig. Styrelsen i UEA har lyssnat på kritik och förslag från medlemmarna, och ställt sig positiv till att lägga programmen i «block».

Två medlemmar i kongresskommittén hade förslaget med sig till styrelsemötet i Rotterdam den 23 november. Det var Roland Lindblom och Ulla Luin, som tagit ledigt från jobbet för att resa dit.


En serie föredrag

Kongressens huvudämne, «Diskriminering», kommer att behandlas i en serie föredrag som följs av diskussioner i små grupper. Föredragen ska beröra ras, kön, ekonomi och språk, och läggs kl. 14 varje eftermiddag.

Direkt efter föredragets slut går deltagarna till grupper av olika slag. Det finns «allmänna» grupper, där den vanliga kongressdeltagaren får prata av sig sina erfarenheter och åsikter. Dels blir det specialiserade grupper som penetrerar olika slag av diskriminering och försöker få fram synpunkter för kongressresolutioner. Dessutom kommer antagligen särskilda grupper för ungdomar att ordnas.

Ämnet «diskriminering» tas också upp i flera av föredragen i ISU, det internationella sommaruniversitetet.

Två grammofonskivor från 1926 med bl a tal av Privat är de första dyrgriparna som erbjudits UEA för den planerade auktionen, som omnämns i förra numret av *La Espero*.



En lite ovanlig syn på Folkets Hus i Stockholm, där invigningen och de flesta andra arrangemang kommer att äga rum.

Ungdomar särskilt välkomna

Muzika posttagmezo, musikföreläsning, är en tanke som håller på att ta form. Ungdomar, fria musikgrupper, trubadurer, både amatörer och mer yrkesmässiga musikanter, får ett tillfälle att spela inför publik — ett tillfälle som kongresserna inte brukar kunna ge i denna form.

Traditionella *Junulara vespero*, ungdomskväll, och debatter om ungdomsfrågor kommer att spridas ut över kongressveckan för att inte ge en alltför koncentrerad ungdomsdag.

Någon frågade om vi inte ska ordna en flygbladsutdelning i

Stockholms centrum, i stil med den som TEJO-kongressen 1969 (den i Tyresö) ordnade i Stockholm. Frågan går vidare till kongresskommittén.

Gdansk före, Oslo efter

Gdansk och Oslo har länge diskuterat för- och efterkongress, och nu fattas bara överenskommelse om ekonomin. Sverige ska också bjuda på sina bästa sidor: Dalarna, Gotland, fjällen och Skåne.

Utställning

En stor väggmålning som växer

fram under kongressen planeras. Kongresskommittén ska söka bildkonstnärer från olika världsdelar, som är villiga att offra någon kongressdag för att tillsammans göra en bild av ämnet «Valet av internationellt språk är en fråga om jämlikhet».

Kongressen öppnas annorlunda

Tre programpunkter blir det av det som traditionellt kallas kongressens öppnande.

Hälsningar från olika länders esperantoförbund blir en punkt på *Interkona vespero* — ett sätt att lära känna varandra. Musik och några öppningstal läggs på söndagens förmiddag. Inbjudna diplomater får tillfälle att hälsa kongressen på måndagens eftermiddag, och den högtidligheten följs av bankett och kongressbal.

Följer med spänning

I mitten av november hade 250 personer anmält sig till kongressen. Det är ett lite mindre antal än vid samma tid förra året — men första gränsdatum för låg avgift är inte förrän 31 december. Kommittén följer antalet med spänning.

Ännu har kongresskommittén inte så klart grepp om alla kostnader, att man kan se framtiden an med tillförsikt. För att budgeten ska gå ihop måste kommittén kunna räkna med ett större deltagarantal än man gjort, eller också skära ner programkostnaderna. Därför blir det extra spännande efter årsskiftet: ser det ut att bli så många anmälningar att budgeten kan balanseras?

Ulla Luin

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
Adress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Ansvarig utgivare:
Bertil Åkerberg
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
Telefon hem: 08 - 712 82 91
I redaktionen:
Sven Alexandersson,
Åke Blomberg,
Anita Lindblom
Prenumeration: 40 kronor
per år, postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med
8 nummer per år: i februari,
mars, april, juni, september,
oktober, november och
december
Manusstopp: den 10, måna-
den före utgivningsmånaden
Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet AB,
Stockholm 1979

Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Besöksadress: Hägervägen 31
(T-station Tallkrogen)
Telefon: 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har
öppet tisdagar kl. 18 — 20
Postgiro: 20 12-3
Medlemsavgift: direkt-
ansluten medlem 50 kronor,
ungdomsmedlem under 26 år
25 kronor, familjemedlem
(utan tidning) 15 kronor
Prenumerationsavgift för
La Espero och *Esperantonytt*
ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet
SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress:
Fack, 20042 Malmö
Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B
Öppettider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11,
torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även
under sommaren
Telefon: 040 - 12 20 29
Postgiro: 578 - 5
Expedition:
Anna-Greta Strörne
Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande:
Åke Blomberg

JESÖNE

Om detta nummer och kommande

Detta nummer är det sista ordinarie numret för i år. Men ett nummer återstår (*La Espero* utkommer ju med åtta nummer varje år) och det kommer under december. Det blir ett speciellt nummer — du får själv se vad det är om så småningom. Det blir ett nummer helt på esperanto.

Ganska mycket esperanto hittar du också i detta nummer. Liksom i fjol avslutar vi året med en längre översättning ur den svenska litteraturen. I år är det början till Karin Boyes sroman *Kallocain*. Använd den som extra läsövning under juldagarna.

Även om ett nummer av tidningen återstår, får vi använda detta nummer för att önska alla en trevlig helg!

Ge *La Espero* i gåva (med rabatt)

Även för nästa år gäller erbjudandet att du får gåvoprenumerera på *La Espero* med 50% rabatt. Det kan du göra, om du själv redan har *La Espero* (som medlem eller prenumerant). Du kan dock använda detta erbjudande bara för gåvoprenumerationer åt vänner och bekanta utomlands och för institutioner i Sverige (t ex väntesalar, mottagningar, salonger o dyl).

När det gäller bibliotek försök att i första hand övertyga dem att själva prenumerera till hel avgift. Många bibliotek gör det redan. *La Espero* finns med på Bibliotekstjänsts prenumerationslista, så det är mycket enkelt för biblioteken att ordna en prenumerationslista.

Passa på och ge dina bekanta utomlands *La Espero* i gåva under 1980, kongressåret. Det kostar bara 20 kronor.

Direktanslutna medlemmar

Medlemsavgiften till SEF är för nästa år densamma som för i år. Om du är direktansluten medlem, betalar du:

50 kr för direkt medlem med tidning
25 kr för ungdomsmedlem med tidning (under 26 år)
15 kr för familjemedlem utan

tidning.

Du betalar till postgiro 20 12-3, Sv. Esperantoförbundet. Finns det en förening i din närhet, ska du helst gå med i den — det är då du kan använda esperanto oftare.

30-tal deltagare i kursledarkurs

I Karlskoga Folkhögskola samlades den 28 — 30 september ett trettiotal deltagare till en kursledarkonferens. Genast på fredagskvällen fick konferensen en bra start, då Lars Forsman, lärare vid skolan, föreläste om vuxenpedagogik och demonstrerade hur man med små medel kan «knäppa upp» sina elever.

Söndagen ägnades åt grupparbeten kring studiecirklarna och dess arbetsformer, med Ulf Levitin, Örebro, som handledare.

På lördagskvällen besöktes gruppen av adjunkt Karl M. Blomkvist, som redogjorde för sitt arbete om bl a ordbildning. Samtidigt fick några ur gruppen tillfälle att en kort stund informera några ungdomar ur elevkåren om esperanto. Efter en uppskattad ostbricka inledde Roland Lindblom en diskussion om den svenska esperantorörelsens framtida arbete. Diskussionen gav en hel del utbyte av idéer och bl a stöddes tanken att förbundet för att effektivisera sin verksamhet bör ha anställd personal.

Söndagsförmiddagen va Lenart Åbergs som gav några tips

om cirkelarbeta och lämplig litteratur i pedagogik, allmän språkkunskap och esperanto.

Många av de nöjda deltagarna efterlyste en fortsättning på konferensen, främst med mera metodik på programmet, och vi kan räkna med att få höra mera om detta i vår från arrangörerna Kerstin och Åke Rohdin. Anita Lindblom

Firande förening fick stipendium

La Espero har redan nämnt att Hallsbergs Esperantoförening firar sitt 50 års jubileum i år. Själva firandet ägde rum på riktigt söndagen den 14 oktober.

Innan själva festligheterna började fick de gäster, som inte var esperantister, medverka i en sång på esperanto på en känd Rolfsmelodi. Det gjorde att den sedvanliga högtidligheten övergick till spontanitet hos de medverkande och uppvaktande representanter.

Man föredrog en prolog, för dagen skriven på svenska, och en resumé på esperanto. Efter esperantohymnen var det gratulanternas tur. Hallsbergs kommun lyckönskade och överlämnade ett stipendium för att stimulera intresserade att lära det internationella språket.

Även lokala folkrörelser, med vilka klubben har nära kontakter, gratulerade med tal och gåvor. Förbundsstyrelsen gratulerade genom Märtha Andreasson, som lämnade häls-

Gör det nu!


Nu är det tid att betala UEA-avgifterna för år 1980:

MA (medlem med årsbok och tidningen Esperanto) 140 kr
MJ (medlem med årsbok) 56 kr

Tillägg till ovanstående avgifter:
SZ (medlem i Societo Zamenhof) 280 kr

UEA behöver allt stöd för att kunna genomföra sitt arbete. Vi kan stödja UEA ekonomiskt genom medlemskap i Societo Zamenhof. Fler svenskar borde vara med!

Du betalar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto. Anteckna på talongen vad betalningen gäller.



HODIAŬ

Finiĝas la Internacia jaro de la Infano, sed restas la problemoj ankoraŭ nesolvitaj

ningar och tack för initiativet med manifestationen, samt överlämnade en buket blommor.

Länets esperantoföreningar lyckönskade med blommor och tal. Örebroklubben hade även översänt ett belopp till SEF i anslutning till nämnda manifestation. Från Eric och Rut Carlén anlände hälsningar från Rom; före festligheterna hade gratulanterna översänt ett par ljusstakar av marmor att användas vid klubbens sammankomster. Anna Sandgren berättade spirituellt om sina första kontakter med utländska esperantister. Under den åtföljande teupén fortsatte den familjära stämningen med musik och allsång. Som avslutning utlottades bland deltagarna skänkta esperantoobjekt. (S.G.)

Venis letero el Zairio

Malfermi bankkonton vi kaj mi povas fari kiel ajn facile. Sed en aliaj landoj ankaŭ tio povas esti problemo. SEF ricevis en novembro leteron, kiun ni pludonas al vi senŝange.

«Por malfermi bankon konton por Esperanto-Instituto de Zairio, nia landa esperanto-asocio, zaira banko postulis de ni mondeponon de 1500 zairoj kiel garantian, tiel ke duono estu pagota en monbiletoj kaj duono en internaciaj respondkuponoj.

EIZ disponas ĝis nun pri pli malpli 750 zairoj, sed estas tre malfacile trovi surloke grandan kvanton de internaciaj respondkuponoj (proksimume 1000!).

Sekve, ni turnas nin al niaj gesamideanoj kun la peto, ke ili helpu kaj subtenu nin. Estus dezirinda ricevo de 3 aŭ 5 irk de ĉiu leganto de tiu ĉi letero. Amasa ricevo de respondkuponoj helpus ne nur EIZ, sed la tutan esperantan movadon. Ĉia ajn helpo estas ĉiam bona: Esperanto-Instituto de

Zairio, Nduantoni Bakidila Ngangu, B.P. 13 Lukala (Bas-Zaire)»

Se vi havas respondkuponojn hejme, eble vi povos sendi al EIZ, kie ili povos fari grandan utilon.

Niaj gratuloj al 70-jara Ivo

La San de novembro la antaŭa prezidanto de UEA, Ivo Lapenna, fariĝis 70-jara.

Esperantisto li fariĝis en la fora jaro 1928, do li jam pli ol 50 jarojn utiligas esperanton. Depost 1938 li aktivis en la internaciaj organizaĵoj (IEL kaj UEA), inter 1964 kaj 1974 kiel prezidanto.

Li estas tre konata oratoro kaj kiel tia li elstaris dum la Universalaj kongresoj.

Niajn bondezirojn al la jubileanto!

Por fini: citaĵo el esperanto

«Verŝajne, ni konscias, ke la demando ne plu estas, ĉu esperanto entute foje akceptiĝos kiel la ĉefa internacia komunikilo. La demando nun tekstas nur, kiam ĝi ekludos tiun rolon. Kiom longe necesas ankoraŭ atendi? Ĉu sufiĉas pasive atendi? Kiel ni en la movado povas proksimigi tiun tagon de la ĝenerala akceptiĝo? Ne plu do temas pri tio: ĉu entute, ĉu foje. Temas nur pri tio: kiam. Se vi ne kredas, ke la demando ĝis tiu grado preciziĝis, kion vi do serĉas kaj faras en la esperanto-movado? Almenaŭ ni, kiuj apartenas al la movado, devas firme kredi je la sukceso de la internacia lingvo. Ne eblas efike kaj celtrafe agi, se mankas fido, se oni ne kredas, se oni ne vidas la celon, se oni ne sukcesis konvinki sin mem pri la realeco de nia batalo».

sm en esperanto, nov 1979

Hieraŭ mi ricevis inter la alvenintaj poŝtaĵoj kajeron, kiam mi vane atendis dum la tuta Internacia Jaro de la Infano 1979. Ĝi venis el Danlando kaj eldonis ĝin la Dana UNICEF-Komitato*. En esperanto. Ĉi-apude vi povas vidi paĝduon el tiu kajero, kiu estas 32-paĝa kaj plenkolora presita.

Infanoj en la mondo (tio estas ĝia titolo) ne estas amuza fabelo por infanoj, kiuj bezonas fabelon por povi ekdormi en la vespero. Ĝi estas, kontraŭe, tre serioza prezento de la problemoj, kiuj tuŝas la infanojn en la mondo ĉiutage. Ĝi estas farita por infanoj, por ke ili komprenu, sed ĝi same multe taŭgas por la gepatroj, por ke ankaŭ ili komprenu. Ĉar malgraŭ ĉiuj belaj vortoj, multfrazaj deklaraĵoj kaj malnovaj promesoj, la mondo de la infanoj ne estas mondo por infanoj.

Mi ŝatus citi el tiu kajero, sed kiam mi tralegas ĝin kaj notas, mi rimarkas, ke mi ŝatus citi ĉion, vorto post vorto, frazo post frazo. La kajero estas plena de veroj, ofte amaregaj veroj, kiujn oni devas diri.

Kiam mi rigardas Infanoj en la mondo mi pensas ankaŭ pri alia kajero, kies eldonon oni diskutis dum ĉi tiu jaro. Ĝi estas sveda kaj povus titoliĝi Ni loĝas en sama domo, se ĝi povus aperi. Ankaŭ ĝi temas pri la infanoj en la mondo, laŭ sia maniero: infanoj, kiuj loĝas en la sama domo kaj montras al siaj gepatroj, ke kunlaborado estas necesa, se oni volas solvi la komunajn problemojn. Alispeca libro, eble pli amuza ankaŭ, sed samtempe tre simila libro, bona kompletigo de la dana.

La Internacia Jaro de la Infano baldaŭ finiĝos, sed restos la problemoj, kiujn oni deziris prilumi dum ĉi tiu jaro. Ke la kajero Infanoj en la mondo aperis nur je la fino de la jaro, ne gravas: ĝia signifo restas. Ne nur kiel publikaĵo en esperanto, eldonita de dana ŝtata aŭtoritato, sed kiel memorigilo pri la problemoj solvendaj. Ke la sveda Ni loĝas en sama domo ankoraŭ ne aperis, same ne gravas: ĝi estos same aktuala, kiam ajn ĝi aperos. Kaj same bona.

Franko Luin

*Billedvej 8, DK-2100 København Ø

Post dek du jaroj — fine mi vizitis PIF

Finfine mi travivis PIF-on, aranĝon, kiun mi sekvis de la komenco antaŭ 12 jaroj kaj ofte intencis viziti. Ĉijare la intenco iĝis realo, eble danke al afabla invito de Spomenka Štimec, la sekretariino de la *Internacia Kultura Servo* en Zagreb, kiu aranĝas ĉiujare la festivalojn.

Dum la semajno tie min gastigis Saĉa Sirovec, ĉarma juna esperantistino, kaj ŝiaj simpatiaj gepatroj. Tio donis al la vizito specialan valoron pro la direktaj personaj kontaktoj kaj la afabla hejma atmosfero.

Kio estas PIF?

PIF estas konkurso inter profesiaj pupludistoj. Oni uzas esperanton dum la prezentadoj. Oni gajnas premiojn kaj por plej bona arta prezentado kaj por bona lingvouzo esperanta sur kaj ekster la scenejo. Estas premioj por grupoj kaj por unuopuloj.

Ĉijare partoprenis ensembloj el Jugoslavio, Francio, Hispanio, Rumanio kaj Pollando. Estis malpli da grupoj ol ordinaro. Esperanto-gastoj-spektantoj venis krome el Japanio, Nederlando, Svedio kaj Usono. Gastoj neesperantistaj venis krome el Norvegio kaj Hindio.

La festivalo estis aranĝita en kunlaboro kun la norvega urbo Tromsø, kiu estas ĝemela urbo de Zagreb. El Tromsø venis kvin da personoj, inter ili kelkaj infanoj. En 1978 okazis fe-

stivalo en Tromsø unuafoje kaj estas planite, ke PIF fariĝu duurba aranĝo, unu jaron en Jugoslavio kaj la alian en Norvegio.

La duurban karakteron de la aranĝo oni rimarkis ankaŭ dum la oficiala inaŭguro de la festivalo, kiu komenciĝis per akcepto ĉe la urbestro, ĉar tie partoprenis ankaŭ la norvega konsulo en Zagreb (kiu, parenteze menciite, estas bonega esperantisto). Li ankaŭ ĉestis la oficialan malfermon en la ĉefsalono de PIF en Dubrava, kie ĉestis ankaŭ la prezidanto de la Socialisma Unuiĝo por tiu regiono.


Flanke de la festivalo okazis ankaŭ la *8-a Internacia Renkontiĝo de Lernantoj-Esperantistoj*. Partoprenis infanoj el Italio, Norvegio, Hungario, Kanado kaj Jugoslavio. Ili havis propran programon, i a ili ludis kaj prezentis siajn proprajn pupteatraĵojn.

La programo

La unua grupo, kiu ludis, estis *Pup teatro Zadar* el Jugoslavio.

Ili prezentis *La firma stana soldato* de H.C. Andersen. Ili parolis bone esperanton kaj faris multajn teknikajn aranĝojn, sed donis al mi konfuzan impreson.

La du sekvaj tagoj estis plenaj de aranĝoj. *Pup teatro el Beograd* prezentis fabelon *Aska kaj*



lupo de Ivo Andrić. Ĝi tre plaĉis al mi, sed ĝi ne estis pupteatro, sed baletto.

Ŝtata pup teatro «Rabcio» el Pollando ludis *Pri muzikanto Zvirtala* de J. Wilkowski. Tiu prezentado vere tre plaĉis al mi, sed mi aŭdis de ie, de spertulo pri pup teatro, ke ĝi estis tro ordinara kaj konvencia.

Pup teatro Constanta el Rumanio elektis prezenti *La infanoj el steloj* de Oscar Wilde. Ankaŭ tiu teatraĵo estis vere sperte prezentata kaj la lingvo, same kiel en la pola, estis bonega.

Pup teatro du Fust el Francio ludis *Ariana kaj Blubarbulo* de Maeterlinck kaj la *Puplernejo Barcelona* el Hispanio ludis *La fanfaronanta militisto* de Plaut. Tiuj du estis faritaj en iom alia maniero. Lingve ili ne estis same bonaj kiel la kvar unuaj. Oni havis jam pretan sonbendon kun muziko kaj parolo en la franca respektive katalana lingvoj. La tradukon en esperanton oni solvis en du diversaj manieroj: la francoj uzis esperantistinon, kiu laŭtleĝis la replikojn flanke de la franca elparolo; tio funkciis sufiĉe bone. La katalanoj projekciis la esperantotekston sur tabulon samtempe kun la teatraj replikoj. Tio ne estis bona metodo, ĉar ne estis sufiĉe da tempo por kaj legi kaj rigardi la vere tre spertan manipulado de la pupoj. Estis, do, malfacile bone sekvi la «fadenon» kaj kompreni la enhavon, sed mi ĝuis ĝin kiel pantomim teatraĵon.

Ankaŭ la maniero prezenti la teatraĵojn diferencis. La francaj kaj katalanaj pupistoj la tutan tempon movis sin sur la sce-

nejo, tute kovritaj de grizaj kapotoj; en la franca unu persono manipulis unu aŭ du pupojn, dum en la barcelona du personoj manipulis unu pupon.

Okazis ankaŭ eta prelego de Ehara Tyioko el Tokio pri japana tradicia puparto. La prelegon ŝi ilustris per diapozitivoj. Ŝi ankaŭ rakontis pri la agado de PUK en Tokio kaj sciigis, ke venontjare kredeble partoprenos japana grupo en la festivalo.

Ekster la festivalo mi havis okazon vidi prezentadon de *Kwak*, amatora pup teatra grupo el Zagreb. Estis programo speciale aranĝita por infanoj, kaj vere ili, same kiel mi, ĝuis ĝin.

Entute estis vere enhavoriĉa semajno en Zagreb. Vere ĝojiga surprizo estis vidi, ke la laborema grupo, kiu tiel bonege prizorgis la tutan aranĝon, konsistis el junaj esperantistoj. La direktoro de la oficejo, Zlatko Tišljak kaj la sekretario, Spomenka Štimec, same kiel ĉiuj kunlaborantoj faris kaj faras admirindan laboron. Estas kultura aranĝo, kiu vere valoras nian apogon.

Mi ne scias, kiu gajnis la konkurson, ĉar mi devis veturi hejmen kelkajn horojn antaŭ ol la juĝantoj, Kikušima Kazuko el Japanio, Finta Csaba el Jugoslavio, Roger Imbert el Francio kaj Jim Cushing el Usono, finis sian laboron. Kaj al mi tio ne gravas, ĉar ĉiuj estis tiel spertaj, ke ili, laŭ miaj «amatorokuloj», valoras premion. Sed se vin interesas, vi certe trovos sciigon pri tio en, ekzemple, *Heroldo de Esperanto*.

Märtha Andréasson

pre
nu
mer
e
ra!

Heroldo de Esperanto	63,—
Kontakto	42,—
Oomoto	22,—
Sennaciulo	75,—
Literatura Foiro	38,—
Kulturaj Kajeroj	35,—
Norvega E-isto	16,—
El Popola Ĉinio	
1 år	15,—
2 år	22,50
3 år	30,—
<i>(priserna för El Popola Ĉinio gäller för prenumerationer som tecknas före 31 januari 1980)</i>	

ESPERANTOFÖRLAGET
Box 7502, 200 42 Malmö
Postgiro 578-5

Klubo por aŭtistoj: ĉu vi jam aliĝis?

Ĉu vi scias, ke ekzistas internacia klubo por aŭtomobilistoj? Ĝi nomiĝas IEKA (Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista).

La unua celo de IEKA estas aplikado de esperanto kiel solvo de la lingvaj problemoj en la aŭtomobilistaj medioj.

IEKA estas fondita komence de la jaro 1965 kaj la unua prezidanto estis s-ro Maurice Jau-motte, Belgujo. Post lia morto s-ro Giuseppe Grattapaglia, Italujo, transprenis la torĉon kaj

estis prezidanto ĝis 1974, kiam li ekloĝis en Brazilo. Dum la UEA-kongreso en Hamburgo d-ro Werner Bormann, Germanujo, fariĝis prezidanto kaj s-ro Jean Guillaume, Francujo, estas depost tiu tempo sekretario. En 1978 s-ro Gustav Kühlmann, Danlando, estis elektita prezidanto.

La membronombro kreskas ĉiujare. Nun IEKA havas proksimume 1200 membrojn en 35 landoj, inter ili Aŭstralio kaj Novzelando. Troviĝas 29 landaj


reprezentantoj, kaj se vi rigardas en la jarlibro de UEA, vi trovos 60 SOS-aŭto-delegitojn, kiuj estas pretaj helpi esperantistojn el la tuta mondo rilate al aŭtomobilaj aferoj.

En 1978 okazis ralio al la kongreso en Varna, Bulgarujo. Reprezentantoj en 14 landoj en Eŭropo helpis kaj estis pretaj akcepti samideanojn vespere por doni informojn pri hoteloj, restoracioj, kapadejoj kaj turismo. Kelkaj aranĝis akcepton en la loka klubo.

Belga samideano, s-ro Hector Boffejon, laboras per eldono de aŭtomobilista fakvortaro en 7 lingvoj, kiu entenas 5000 vortojn. Li havas la helpon de ok specialistoj en diversaj landoj. Tiu libro devos havi saman sukceson kiel la Komerca vortaro, kiu jam estas reeldonita.

IEKA havis financon helpon de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj de la Komerca fako, sed nun ĝi havas nur la malaltan kotizon de 20 kronoj — *dumviva kotizo!* — kiu apenaŭ sufiĉas por kovri la elspezojn.

Tamen IEKA daŭre laboras kun entuziasmo, ĉar ĝiaj membroj scias, ke ili baldaŭ pruvos



la praktikan utilecon de esperanto. Sed por ke la laboro fariĝu ankoraŭ pli bona kaj efika, necesas, ke IEKA plialtigu la membronombrojn. Kiel ni jam menciis, la kotizo estas 20 kronoj por dumviva membreco. Por tiu malgranda sumo oni ankaŭ ricevas insignon kun la kluba emblemo.

Fariĝu membro en la plej internacia kaj plej malmultekosta aŭtoklubo en la mondo!

Sendu vian aliĝon al Elly Persson, Klörupsvägen 27 B, 231 00 Trelleborg, telefono 0410 /13138, poŝtĝirkonto 52 26 02-2.

Grandaj & ĝravaj verkoj en esperanto

SKOTA ANTOLOGIO

kun interesa antaŭparolo de William Auld pri la skota literaturo. El la enhavo: verkoj de Burns, Scott, Stevenson kaj 50 pliaj skotaj verkistoj.
255 paĝoj **54 kr**

ENKONDUKO EN LA ORIGINALAN LITERATURON DE ESPERANTO

de William Auld, kun enkonduka eseo kaj bibliografio de R. Hauptenthal.
101 paĝoj **54 kr**

ĈIU ĈIUN

sep jardekojn en la esperantomovado. La granda memorlibro de Teo Jung, vere historia dokumento
400 paĝoj **110 kr**

ELEKTITAJ FABLOJ

de IA Krilov, unu el la plej elstaraj fablistoj en la monda literaturo. El la rusa tradukis S G Rublov. Riĉe ilustrita. Apartenas al la serio Oriento-Okcidento.
336 paĝoj **65 kr**

ANIARO

de Harry Martinson, nia propra eldonaĵo, tradukita de William Auld kaj Bertil Nilsson, unu el la majstroverkoj de nia tempo; apartenas al la serio Oriento-Okcidento.
174 paĝoj **70 kr**

ESPERANTOFÖRLAGET

Box 7502, 200 42 Malmö
Poŝtĝirkonto 578-5

— KLUBBAR —

Ingen brist på initiativ i Västeråsklubben

Ur *Veka gazeto*, medlemsbladet för Västerås Esperantoklubb, saxar vi följande:

«Ett helt nytt grepp för att sprida kännedom om esperanto tog Västerås Esperantoklubb i lördags kväll (3 nov) genom att ställa upp som arrangör för drogfri diskoteksdans i Maria-berget tillsammans med Park och Fritid. Etthundrafemtio ungdomar (fler släpptes inte in) dansade av hjärtans lust och fick då och då under kvällen på olika sätt en påminnelse om att det finns ett internationellt språk som kallas Esperanto samt fördelarna med detta språk.

Kvällen var väl förberedd av Gunilla, Wim, Chris och Kaj. Litteraturutställningen fanns på plats i foajén, där ungdomarna ofta uppehöll sig mellan danserna. Där visades också hela tiden ett trevligt sammansatt bildband om esperanto och klubbens verksamhet. Kaj bjöd på musik med något mjukare tongångar i ett särskilt avlyssningsrum.

För att fånga ungdomars in-

teresse idag fordras framför allt underhållning. En verkligt god underhållare hade klubben också lyckats engagera, nämligen Clas-Göran Dahlberg, som gjorde två bejublade framträdanden tillsammans med vår polska esperantovän Tamara Fornal, och så Kaj med sin basfiol, som i dubbel bemärkelse gav tyngd åt underhållningen. Det är en lycka för klubben att ha en sådan mångsysslare som ordförande. Tamara och Clas-Göran (gitarr och dragspel) sjöng både på esperanto och diverse exotiska tungomål från Mellersta Afrika och lyckades tända publiken och få den med sig i sångerna. Bra gjort!

Alla verkade nöjda och belåtna, då de vandrade ut från «Berget», var och en med ett flygblad om esperanto i näven, som Siri försett dem med, samtidigt som hon lämnade ut tackjackan från garderoben.

Sven Ericsson»

Det behövs nog ingen kommentar till ovanstående klipp. Gå och imitera!

Karin Boye

Hallokaino

La libro, kiun mi nun estas verkanta, devas ŝajni sensenca al multaj — se mi entute kuraĝas imagi, ke «multaj» rajtos legi ĝin — ĉar mi tute memstare, sen ies ordono, komencas tian laboron kaj tamen mem ne komprenas, kio estas ĝia intenco. Mi volas kaj devas, tio estas ĉio. Pli kaj pli senindulge oni postulas intencitecon kaj planitecon en tio, kio estas farata kaj dirata, tiel ke prefere eĉ ne vorto falu senplane — nur la verkanto de la jena libro devigis iri la malan vojon, en la neintencitecon. Ĉar kvankam miaj jaroj ĉi tie kiel malliberulo kaj kemiisto — ili devas esti pli ol dudek, mi kredas, — estis tamen plenaj je laboro kaj urĝo, devas ekzisti io, kio ne opinias, ke tio sufiĉas kaj kio gvidis kaj superrigardis alian laboron interne de mi, kiun mi mem ne havis eblecon superrigardi

Mallonge: iamaniere mi povis senti min pli libera ol en libereco. Sed samtempe kun la kvieto kreskis en mi ankaŭ ĉi tiu stranga laboro pri la pasinteco, kaj nun mi ne sentos trankvilon antaŭ ol mi estos skribinta miajn memorojn pri iu enhavoriĉa tempo en mia vivo. Eblecon skribi oni donis al mi pro mia scienca laboro, kaj oni kontrolas nur en la momento, kiam mi transdonas pretan verkon. Mi povas do oferi al mi mem ĉi tiun solan amuzon, eĉ se tio estos la lasta afero, kiun mi havos eblecon fari.

Je la tempo, kiam komenciĝas mia rakonto, mi proksimiĝis al la kvardekaj jaroj. Se mi cetere devas prezenti min, mi eble rakontu, laŭ kiu bildo mi imagis al mi la vivon. Ekzistas malmultaj aferoj, kiuj diras pli pri iu ol ties bildo pri la vivo: ĉu oni vidas ĝin kiel vojon, kiel batalkampon, kiel kreskantan arbon aŭ ondantan maron. Mi mem vidis ĝin per okuloj de nai-va lerneĵano kiel ŝtuparon, laŭ kiu oni rapidis de ŝtupo al ŝtupo kiel eble plej rapide, kun anhela spiro kaj konkurantoj je la kalkano. En la vero mi ne havis multajn konkurantojn. Plej multaj el miaj laborkamaradoj en la laboratorio dediĉis sian tutan gloriavidon al la militista kampo kaj pritraktis la taglaboron kiel tedan, sed necesan interrompon de la vespera militservado. Mi mem apenaŭ kuraĝus konfesi al iu el ili, kiom pli mi interesiĝis pri mia kemio ol pri mia militservado, kvankam mi vere ne estis malbona sol-

kaj en kiu mi tamen estis profunde kaj preskaŭ dolorige kuninteresita. Tiu laboro estos finita, kiam mi estos skribinta mian libron. Mi komprenas, do, kiel malsaĝaj miaj skribaĵoj devas ŝajni rilate al racia kaj praktika pensado, sed mi tamen skribas.

Eble mi ne kuraĝus fari tion pli frue. Eble eĉ estas la mallibereco, kiu igis min facilanima. Miaj vivkon- diĉoj nun diferencas tre malmulte de tiuj, laŭ kiuj mi vivis kiel libera homo. La manĝaĵo montriĝis esti apenaŭ rimarkeble pli malbona ĉi tie — al tio mi kutimiĝis. La kuŝbreto montriĝis esti iom pli malmola ol mia lito hejme en Kemiurbo nro 4 — al tio mi kutimiĝis. Mi iom pli malofte eliris en la liberan aeron — al tio mi kutimiĝis. Plej sentiĝis la disigo de mia edzino kaj miaj infanoj, speciale ĉar mi nenion sciis nek scias pri ilia sorto; tio igis miajn unuajn jarojn en mallibero plenajn je maltrankvilo kaj angoro. Sed kun la paso de la tempo mi komencis senti min pli trankvila ol antaŭe kaj eĉ ekŝatis pli kaj pli mian estadon. Ĉi tie mi ne havis kaŭzon esti maltrankvila. Mi havis nek subulojn nek estrojn — se mi ne pensas pri la mallibere- rejaj gardistoj, kiuj malofte ĝenis mian laboron kaj nur zorgis, ke mi sekvu la ordoregulojn. Mi havis nek protektantojn nek konkurantojn. La sciencistoj, kun kiuj oni kelkfoje renkontigis min, por ke mi povu sekvi la novaĵojn sur la kemia kampo, traktis min ĝentile kaj fakece, eĉ se iom superece pro mia fremda nacieco. Mi sciis, ke neniu opinias min enviinda.

dato. Ĉiukaze, mi ĉaskuris en mia ŝtuparo. Kiom da ŝtupoj oni fakte devis posthavi, tion mi neniam pri- pensis, kaj ankaŭ ne, kiaj logaĵoj povas troviĝi en la subtegmentejo. Eble mi nebule imagis al mi la vivo- domon kiel kutiman urban domon, kie oni supren- iris el la interno de la tero kaj fine eliris sur la tegmen- tan terason, en la liberan aeron, en venton kaj tag- lumon. Al kio vento kaj taglumo egalulo en mia vivo- migrado, mi ne klare sciis. Sed certe estis, ke ĉiun novan ŝtupon simbolis mallongaj oficialaj informoj de supre: pasita ekzameno, akceptita provo, translokigo al pli grava laborkampo. Mi ja havis tutan vicon da tiaj gravegaj finaj kaj komencaj punktoj malantaŭ mi, sed ne tiom da ili, ke unu plia estus sensignifa. Pro tio mi revenis kun iu grado da febro en la sango de la mallonga telefona voko, kiu informis, ke mi povis atendi mian kontrolestron la postan tagon kaj ke mi do povos ekeksperimenti per homa materialo. Morgaŭ do venos la fina fajroprovo por mia ĝis nun plej granda malkovro.

Mi estis tiel ekscitita, ke estis malfacile al mi komen- ci ion novan dum la dek minutoj, kiuj ankoraŭ restis de la labortempo. Anstataŭe mi fuŝfaretis — mi pres- kaŭ kredas, ke por la unua fojo en mia vivo — kaj ekmetis flanken la aparatojn tro frue, malrapide kaj zorge, dum mi kaŝrigardis tra la fenestraj vandoj je ambaŭ flankoj por vidi, ĉu iu atentis min. Tuj kiam la sonorilo signalis, ke la laboro estas finita por hodiaŭ,

mi rapidis eksteren tra la longaj laboratoriaj koridoroj, kiel unu el la unuaj en la fluo. Mi rapide duŝis min, ŝanĝis la laborvestojn al libertempa uniformo, enkuris la elevatoran lifton kaj post kelkaj momentoj staris supre sur la strato. Ĉar ni ricevis loĝejon en mia labor-distrikto, ni havis superteran permeson tie, kaj mi ĝuis, ke mi povis streĉi min en la libera aero.

Kiam mi preterpasis la metrostacion, mi ekpensis, ke mi povas atendi je Linda. Ĉar mi estis tiel frua, ŝi certe ankoraŭ ne atingis hejmen de sia nutraĵfabriko iom pli ol dudek minutojn for de tie per la metroo. Unu trajno estis ĵus alveninta, kaj homrivero elverŝiĝis el la tero, premiĝis tra la bariloj, kie oni kontrolis la superterajn permesojn, kaj disiĝis tra la ĉirkaŭaj stratoj. Super la nun malplenaj tegmentaj terasoj, super ĉiuj kunrulitaj ŝtongrizaj kaj herbejverdaj gudrotukoj, kiuj povis en dek minutoj fari la urbon nevidebla de la aero, mi rigardis la tutan svarmantan aron da hejmenirantaj kunsoldatoj en libertempa uniformo, kaj subite frapis min, ke eble ili ĉiuj havas la saman revon: la revon pri la vojo supren.

La penso kaptis min. Mi sciis, ke pli frue, dum la civilisma epoko, oni devis logi la homojn al laboro kaj streĉo per espero je pli vasta loĝejo, pli bongusta manĝo kaj pli belaj vestaĵoj. Nuntempe nenio tia estis bezonata. La norma loĝejo — unu ĉambro por la fraŭlaj, du por familio — sufiĉis por ĉiuj, de la plej sensignifaj ĝis la plej meritplenaj. La manĝaĵo de la

Ni kompreneble ne povis paroli pro la ekzercado de la aerarmeo, kiu nek tage nek nokte permesis, ke oni interparolu ekstere. Ŝi vidis ĉiukaze mian feliĉan mienon kaj kapjesis kuraĝige, kvankam serioza kiel ĉiam. Ne pli frue ol kiam ni atingis la loĝdomon kaj la lifto estis kondukinta nin malsupren al nia loĝejo, relativa silento ĉirkaŭis nin — la bruo de la metroo, kiu skuigis la murojn, ne estis pli forta ol ke oni povu paroli senĝene — kaj tamen ni zorgeme prokrastis ĉiujn interparolojn, ĝis kiam ni estis interne. Se iu estus rimarkinta, ke ni parolas en la lifto, tiu povus tute prave supozi, ke ni priparolis temojn, kiujn ni ne volas, ke la infanoj aŭ la servistino aŭdu. Okazis, ke ŝtatmalamikoj kaj aliaj krimuloj volis uzi la lifton kiel konspiraciejon; tio estis natura solvo, ĉar policorelo kaj policokulo pro teknikaj kaŭzoj ne povis esti instalitaj en lifto, kaj ĉar la pordisto kutimis havi aliajn okupojn ol kuri kaj aŭskulti en la ŝtuparoj. Ni do atente silentis, ĝis kiam ni eniris la familian ĉambron, kie la servistino de la la semajno jam surtabligis la manĝon kaj atendis kun la infanoj, kiujn ŝi subenprenis el la infanejo de la domo. Ŝi ŝajnis esti ordema kaj afabla junulino, kaj nia ĝentila saluto ne dependis nur de la konscio, ke ŝi, kiel ĉiuj servistinoj, estis devigata raporti pri la familio je la fino de la semajno — reformo, kiu ĝenerale vidite plibonigis la tonon en multaj hejmoj. Etoso gaja kaj agrabla regis ĉe nia tablo, speciale ĉar nia plej aĝa filo, Ossu, estis inter ni.

doma kuirejo satigis kaj la generalon kaj la simplan soldaton. La ĝenerala uniformo — unu por la laboro, unu por la libertempo kaj unu por la soldata kaj polica servoj — estis egala por ĉiuj, viro kaj virino, kaj por altranga kaj malaltranga, kun la escepto de la gradindiko. Eĉ la ĉi-lasta en la vero ne estis pli belaspekta por unu ol por alia. La aspira faktoro en pli alta estrindiko kuŝis nur en tio, kion ĝi simbolis. Tiel ege spiritplena, mi pensis kontenta, estas fakte ĉiu kunsoldato en Mondujo, ke tio, kion li sentas kiel plej altvalora en la vivo, apenaŭ havas pli konkretan formon por li ol tiun de tri nigraj festonoj sur la maniko — tri festonoj, kiuj estas al li garantiaĵo kaj pri lia memestimo kaj pri la estimo flanke de la aliaj. Oni povus satiĝi kaj trosatiĝi de la materiaj ĝuaĵoj — ĝustiel mi kredas, ke la dekduĉambraj loĝejoj de la civilismaj kapitalistoj ankaŭ nur estis simbolo — sed ĉi tiu plej subtila el ĉiuj, kiun oni ĉasas en formo de gradindiko, ĝi neniam trosatigas. Neniu havas tiom da estimo kaj memestimo, ke li ne volas havi pli. Sur tio, kio estas plej spirita, plej aera kaj plej neatingebla el ĉio, baziĝas nia firma socia ordo, sekura por ĉiam.

Tiel mi staris en pensoj ĉe la supreniro de la metroo kaj vidis kiel en sonĝo la gardiston iri tien kaj reen laŭ la pikdrate kovrita distrikta muro. Kvar trajnoj jam venis, kvar fojojn la aroj elverŝiĝis en la taglumon, kiam fine Linda pasis la barilon. Mi rapidis al ŝi kaj ni pluiris flank-ĉe-flanke.

Li venis vizite el la infantendaro, ĉar estis hejmvespero.

— Mi povas rakonti ion plezuratan, mi diris al Linda super la terpomsupo. Mia eksperimento tiom progresis, ke mi rajtos komenci per homa materialo morgaŭ, sub la superrigardo de kontrolestro.

— Kiu estos, laŭ vi? Linda demandis.

Laŭekstere oni certe ne povis rimarki, sed interne mi skuigis je ŝiaj vortoj. Ili povis esti tute senkulpaj. Kio povis esti pli natura ol ke edzino demandu, kiu estos la kontrolestro de ŝia edzo! De la ĉikanemo aŭ komplezo de la kontrolestro dependis, kiom longa la pruvtempo fariĝos. Okazis eĉ, ke gloravidaj kontrolestroj alproprigis al si la malkovron de la kontrolato, kaj oni havis kompareble malmulte da eblecoj defendi sin de tio. Ne estas do strange, ke ies proksimumoj demandis, kiu li estos.

Sed mi kaŝaŭskultis subtonon en ŝia voĉo. Mia plej proksima estro, kaj do verŝajne mia estonta kontrolestro, estis Edo Rissen. Kaj Edo Rissen pli frue estis dungita en la nutraĵfabriko, kie Linda laboris. Mi sciis, ke ili havis iom da reciproka kontakto, kaj pro pluraj signetoj mi konkludis, ke li iom impresis mian edzinon.

Pro ŝia demando vekigis mia ĵaluzo kaj ekflaris. Kiel intima estis en la vero la rilato inter ŝi kaj Rissen? En granda fabriko ofte povis okazi, ke du personoj troviĝis ekster la videblo de la aliaj, ekzemple en magazeno, kie pakegoj kaj kestegoj kaŝis la rigardon tra la vitraj vandoj kaj kie eble eĉ neniu havis okupon je tiu okazo ...